

許六離別詞

VORTOJ DE ĜISO AL S-RO KYORIKU

En lasta aŭtuno mi hazarde vidis lin, kaj ĉi-jare en la komenco de majo ni lamentis elkore pri adiaŭo. Antaŭ la ĝisado li frapis mian herban pardon kaj ni tutan tagon longe babilis. La talentulo ŝatas pentri. Li amas ankaŭ estetikon de hajko.

Mi provis demandi al li: “Por kio vi ŝatas pentri?”

Li respondis: “Mi ŝatas tion por poezio”.

- “Por kio vi amas la poezion?”

- “Por pentri mi amas ĝin”. – li diris.

Kvankam ĉe li du genroj de lernado, tamen unuigita utilo. Konfuceo ja diras: “Virtulo hontas je multeco da talentoj”. Sed estas admirinde, ke du artoj kunfandiĝas en unu utileco. Por mi li estas mia gvidanto de pentrado, kaj li estas mia lernanto de poezio. Sed lia pentraĵo estas penetrita de spirito kaj plena de lerteco je peniko-manipulo. Sufiĉe aprezi la profundecon de lia arto estas malfacile al mi.

Mia hajko ŝajnas kvazaŭ somera kameno aŭ vintra ventumilo. Ĝi kontraŭas al gusto de popolamaso kaj nenie utilas. Tamen poezioj de Huziwara Syunzei kaj Saigyou estas plenaj de estetiko eĉ en la plej vantaj vortoj, diritaj nur eventuale aŭ ŝerceme. Oni diras, ke Eksimperiestro Gotoba degnis skribi: “En iliaj poezioj kuŝas vereco kaj krome estas aldonita tristeco”. Tial do apogante sur ĉi tiujn vortojn, irante laŭ la unu streta linio, ne perdu la vojon. Aldone, estas dirite de Kuukai en lia kaligrafa instruo, ke “Ne sekvu post spuron de grandaj antikvuloj, sed serĉu tion, kion ili serĉis”. “Tiel same en la vojo de poezio” - mi diris al s-ro Kyoriku, akompanante lin kun lumilo ĝis la pordo, mi adiaŭis lin.

Sesa monato, 1693,

Huurabou[vagabondo] Basyoo